ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

N-o 51, 25. sept. 1921. | Ĵurnalo internacia, universala, sendependa eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.) | ★ Eliras semajne. ★

Latine - Angle - Esperante.

Brita Asocio por Akcelado de Sciencoj pri Internacia Helpa Lingvo.

Dum la Kongreso de la British Association for the Advancement of Science, kiu okazis en Edinburgo, 7.—14. septembro, estis prezentata Raporto de Komitato starigita de la Asocio en 1919 por esplori pri la praktikebleco de Internacia Helpa Lingvo. Unuanime la komitato aprobis la dezirindecon de tia lingvo kaj turnis sian atenton al la avantaĝoj aŭ malavantaĝoj de jenaj tri tipoj:

a) mortinta lingvo, ekz. la latina,
b) nacia lingvo, ekz. la angla,
c) arta lingvo, ekz. Esperanto kaj Ido.

Por la subteno de la latina lingvo, la komitato ricevis helpon de speciala komitato de la Klasika Asocio kaj informon kaj konsilon de eminentaj latinistoj.

La meritojn de la angla lingvo subtenis prof. Walter Ripman, la Norda Paca Unuiĝo kaj la English Language Union.

Pri Esperanto informis la komitaton la Brita Esp. Asocio, kaj pri Ido la International Language (Ido) Society of Great Britain.

Tre lertaj argumentoj por ĉiu solvo de la problemo troviĝas en la raporto. Denove la idistoj fanfaronas pri la fama kaj ofte diskreditita Delegacio. Denove ili ripetas la malnovan mensogon. Denove la kulpigon, ke Esperanto estas la elpensaĵo de unu homo, dum Ido estas Esperanto simpligita kaj sciencigita per plibonigoj faritaj de internaciaj filologoj, kiuj laboris pere de centra organizaĵo.

La esperantistoj atentigas pri la historio de Esperanto, pri ĝiaj 15 internaciaj kongresoj, pri ĝiaj sukcesoj en la lernejoj, pri ĝia literaturo, pri la uzo de la lingvo en komerco, pri oficiala subteno kaj pri ĝia granda disvastiĝado. Ili prezentas Esperanton kiel vivantan lingvon, kiu triumfe respondis al ĉiu ebla praktika provo dum 35 jaroj.

Aŭdante la argumentojn, la komitato konkludas, ke la malavantaĝoj de la latina lingvo superas la avantaĝojn. Por angloj ĝi estas pli malfacile akirebla ol hispana, itala, franca, germana aŭ holanda lingvoj kaj senkompare pli malfacila ol Esperanto aŭ Ido; ĝia elparolado estas malfacila, kaj novaj vortoj bezonataj ne estus „latinaj". La internacia lingvo devas esti facile komprenata kaj uzebla de granda nombro da individuoj, kiuj ne estas lertuloj.

La ĉefaj argumentoj por la adopto de la angla lingvo estas 1. ĝia vasta kaj kreskanta uzado, kaj 2. ĝia relative simpla gramatiko kaj riĉa vortrezoro. Kontraŭe 1. ĝia adopto donus grandan politikan avantaĝon al la angle parolantaj popoloj kaj kreus ĵaluzon ĉe aliaj nacioj; 2. ĝia silabado kaj elparolado estas malfacilaj; kaj 3. ĝia manko de infleksioj ktp. kaŭzas dusencecon.

[Pri Esperanto kaj Ido la komitato diras: La elstaranta avantaĝo de ĉi tiuj artefaritaj lingvoj estas ilia granda simpleco: ili estas konstruitaj laŭ zorge elpensitaj sciencaj principoj kaj do estas adopteblaj por multaj diversaj bezonoj. Ili estas neŭtralaj, kaj ili — precipe Esperanto — jam faris certan progreson. Aliflanke ili kaŭzas kontraŭemon en iuj rondoj, ĉar ili estas sendispute artefaritaj; la malkonsento inter la du lingvoj estas detruiga por ambaŭ; kaj neniu el ili estas uzata ĝis iu grado komparebla al iu ekzistanta granda nacia lingvo. La granda facileco, laŭ kiu oni povas lerni ilin, estas tuj konstatebla ĉe tiuj, kiuj studas ilin aŭ faris rektajn observojn . . . Por provi, ĉu Esperanto estas facile lernebla, prof. J. J. Findlay — unu el la komitatanoj — ĵus faris eksperimenton ĉe kurso de instruistoj el duagrada lernejo ĉe Manchester-Universitato, kaj li mallonge konkludas: a) praktika scio de Esperanto estas havebla pli rapide ol de iu natura lingvo, antikva aŭ moderna; instruado de tri semajnoj sub bona instruisto sufiĉas por ebligi al kurso de instruistoj venki la fundamentojn kaj akiri fluecon malofte atingeblan ĉe franca kaj germana lingvoj post dekdu monatoj da studado en la landoj, en kiuj oni parolas tiujn lingvojn; b) ĝia konstruo allogas la intelektan intereson de la lernanto kaj invitas lin antaŭeniri por kompletigi la venkon; kaj c) metodoj de instruo estas precipe gravaj.]

Kvankam la facileco estas grava, la plej facila lingvo ne estas nepre la plej bona, ĉar ĝi povas esti nepreciza. Por ke oni povu juĝi pri precizeco, la komitato havigis al si tradukajojn en latinan lingvon, Esperanton kaj Idon de elektitaj anglaj tekstoj, kaj kelkaj paralelaj elĉerpaĵoj troviĝas en la Aldono al la Raporto.

La argumento, ke Esperanto kaj Ido ne estas veraj „vivantaj lingvoj", sed artefaritaj malvivaĵoj, ŝajnas esti bazita sur sentimento kaj antaŭjuĝo, kaj ne estas pli valida ol simila argumento kontraŭ la praktikebleco de stenografio, sinteza indigoto kaj artefarita sterko. Ekzistas pruvo, ke Esperanto jam faris grandan progreson malgraŭ akademia antaŭjuĝo, malgrandaj rimedoj kaj nacia sentimento. Skeptikeco foriĝas, kiam oni ĉeestas publikan kunvenon, en kiu la arta lingvo estas parolata, aŭ vidas studentojn ĝin studantaj.

La komitato ne entreprenis juĝi pri la respektivaj pretendoj de Esperanto kaj Ido. Ĝi konstatis, ke ambaŭ lingvoj estas praktikaj kaj ke la diferencoj inter ili estas pri detaloj kaj ne pri principoj. Tamen estas evidente, ke devas esti nur unu internacia helpa lingvo kaj do estas precipe grave, ke la skismo, kiu leviĝis inter la protagonistoj de la du lingvoj, estu forigata kiel eble plej baldaŭ. La komitato estas kontenta sciiĝi, ke esperantistoj kaj idistoj konsentos al ŝanĝoj en siaj lingvoj, kiujn faros senpartia, sperta kaj aŭtoritata internacia forto. Vidante la fakton, ke ĉi tiuj lingvoj havas multon komunan kaj ke Ido estas bazita sur Esperanto, espereble la laboroj de tia forto atingus sukcesan rezulton. Esenca estas unueco, kaj priplorinde estus, se projekto unuigi la naciojn estus pereigata de disunuiĝo inter la partianoj.

La elpensinto de Esperanto mem antaŭvidis la eblon, ke la demando pri internacia lingvo estu pritraktata de iu ekstera forto, kies decidoj estos definitivaj, ĉar en letero al esperantisto datita la 18-an de januaro 1908 li skribis: „Kiam nian aferon prenos en sian manon la granda forto (ekzemple la registaroj de la ĉefaj landoj), kiu per sia potenco povos doni al ni ne senvalorajn tro memfidajn vortajn promesojn, sed plenan garantion, ke ĝi alkondukos nian aferon al la celo pli certe ol ni kaj ke ĝi ne faros facilanime iajn decidojn, antaŭ ol ili tute mature kaj perfekte estos pripensitaj kaj praktike elprovitaj kaj fiksitaj, tiam ni povos konfide transdoni al tiu potenca forto la sorton de nia afero".

El la atestaĵo submetita al ĝi, la komitato (krom prof. W. Ripman) konkludas, ke lingvo, de kiu Esperanto kaj Ido estas tipoj, devas esti alprenata kiel la internacia helpa lingvo; kaj ankaŭ, ke, kia ajn lingvo estu alprenata, estu sub scienca kontrolo.

En 1918 la Komitato pri Modernaj Lingvoj starigita de la brita ĉefministro rekomendis, inter alia, „ke komitato estu difinata por esplori pri la kapablo de artefaritaj lingvoj kaj pri la dezirindeco akceli la evoluon kaj uzadon de unu el ili". La raportanta komitato esperas, ke aliaj gravaj akademiaj institucioj, literaturaj kaj sciencaj kaj komercaj organizaĵoj konsideros la demandon ĉiuflanke, por ke povos rezulti vere reprezenta opinio, kiu havos influon ĉe iu supera organizaĵo, kiu devos fari la definitivan decidon. Intertempe diversaj flankaj demandoj kaj problemoj devas esti esplorataj, t. e. la akiro de lingvo, la valoro de internacia helpa lingvo kiel propagando por studado de fremdaj lingvoj, la loko de la lingvo

Esperantista Akademio.

Sekcio por la Scienca kaj Teknika Vortaro.

Dua Cirkulero de la Direktoro.

(Fino.)

Por ĉiu ĝenerala fako kaj ankaŭ por ĉiu duagrada fako, kiu enhavas kelkajn kunlaborantojn, fakestroj bonvolu jam nun sin proponi. Por plenumi sian precipe administran oficon, ili kompreneble ne bezonas persone posedi teknikan kompetentecon pri ĉiuj subfakoj, same kiel la Direktoro ne estas mem kompetenta pri ĉiuj ĝeneralaj fakoj. Nur necese estas, ke ili disponu sufiĉan tempon por oportune rilati kun la fakanoj kaj la ĝenerala fakestro aŭ la Direktoro. Ili ankaŭ ne loĝu tro malproksime de Parizo kaj estu almenaŭ eŭropanoj.

Pri labora plano ne multaj estis la esprimitaj opinioj; unu proponis: „ni komence faru, kion ni ĉefe bezonas", aliaj opinias: „tion ni faru, kion ni nur povas".

Teorie tre alloga estas la unua propono. Teknikaj kompetentuloj — ne devige esperantistoj — starigus nacilingve tabelojn de la plej necesaj vortoj pri „la domo", „la kampo", „elementa tekniko", „internaciaj rilatoj". Poste, esperantaj lingvistoj — ne devige teknikistoj — farus la esperantan tradukon. Bedaŭrinde, praktika sperto montris, ke en samaj kapoj devas troviĝi samtempe teknika kaj esperanta kompetenteco. Sen tia kunesto, oni tre ofte nur venus al ne taŭgaj tradukoj.

La dua propono respondas tiun ĉi necesecon. Nur tiujn teknikajn vortarojn ni nun ellaboru, pri kies teknika materialo ni havas kompetentajn samideanojn. Feliĉe montriĝas el la supra nomaro, ke en ĉiuj plej necesaj fakoj ni havas la bezonatajn specialistojn. Tiel samtempe povas kontentiĝi ambaŭ postuloj: ĝuste tion ni povos fari, kion ni plej bezonas.

* * *

Ankaŭ pri labormaniero de la kunlaborantoj prezentiĝas du malsamaj vojoj: unue, tradukado de naciaj teknikaj vortaroj; due, tradukado aŭ verkado de elementaj lernolibroj en ĉiu fako.

Kelkajn gravajn vortarojn oni citis, nome:

1. Seslingvan **Vortaron pri Inĝenierarto**, eldonitan de Constable & Co., 10 — 12, Orange Str., Leicester Sq., London W. C. 2.
2. Kvarlingvan **„Technisches Wörterbuch"** von Offinger, Stuttgart, J. B. Metzlersche Buchhandlung.
3. **„Illustrierte Technische Wörterbücher"**, Schlomann-Oldenbourg, München u. Berlin, Druck und Verlag von R. Oldenbourg.

La laste nomitaj „Wörterbücher" konsistas el diversaj volumoj; unu estas dediĉita al ĉiu aparta fako. Da tiaj volumoj ekzistis en 1909 jam dek, kaj ili de tiu tempo plimultiĝis.

Ĉu ni traduku, unu post alia, de la komenco ĝis la fino, ĉiujn vortojn de tiuj ĉi grandaj vortaroj?

Praktikemulo prave atentigis, ke la vortarojn ni volas havi sur nia skribotablo, ne en nia ĉerko. Ni do devas elekti, kiel unue tradukotajn, tiujn el la teknikaj vortoj, kiuj estas plej urĝe bezonaj. La ceteraj venos poste.

Por tio mirinde taŭgas la dua proponita metodo. Ni traduku aŭ, pli bone, ni speciale verku en ĉiu fako elementajn kaj poste pli detalajn lernolibrojn. Ni ĉerpu por tio la tradukan materialon el la naciaj teknikaj vortaroj kaj el la jam eldonitaj provaj vortaroj, kiuj estis jam eldonitaj en Esperanto.

Tiuj lernolibroj ne bezonas esti verkitaj laŭ pedagogia vidpunkto, sed ĉefe kun la celo elekti la plej necesajn radikojn kaj praktike provi ilian uzeblecon. Ili eĉ ne nepre bezonas esti plene verkitaj kaj skribitaj, ĉar sendube la plimulto el ili neniam povos esti presita. Sufiĉos, se la celo de elektado kaj praktika provado estos atingita. La vortoj poste aperos en formo de alfabetaj tabeloj, kun esperante redaktitaj klarigoj kaj eventuale komprenigaj ilustraĵoj.

Por la eldonado de la vortaroj, la sama praktikulo, kiun mi jam citis, atentigas, ke mono estas necesa kaj ke financan planon oni devas jam nun starigi. „Mi spertis", li diras, „ke entute la esperantistoj estas oferemaj, kondiĉe ke ili vidas klaran celon, scias, kiu estas responda, kaj regule ricevas informojn pri la spezoj . . . ."

Kiom prava estas nia samideano, ne bezone estas iel insisti, sed ŝajnas, ke ne al la lingvaj institucioj apartenas la esploro de tiu ĉi financa flanko de la demando, kvankam ĝi evidente estas nepre konsiderinda por atingo de praktikaj rezultatoj.

D-ro Pierre Corret
Direktoro de la Akademia Sekcio por la Teknika kaj Scienca Vortaro.

en lerneja programo, la ebleco de akiro de norma elparolado bazita sur fonetika studo de la ĉefaj naturaj lingvoj, kaj la rimedoj por stimuli kaj instrui publikan opinion.

La fina sukceso aŭ malsukceso de iu internacia helpa lingvo determiniĝos de la sintenado de la popoloj. Klerulaj societoj, akademiaj institucioj kaj privataj organizaĵoj povas fari tre utilan pioniran laboron, sed se la publiko ne realigos la dezirindecon kaj praktikeblecon de tia projekto, iliaj penoj ne atingos la deziritan rezulton. *Tout ce qui multiplie les noeuds qui attachent l'homme à l'homme, le rend meilleur et plus heureux.* *W. M. P.*

* * *

Rim. de Red. Kiel ni jam sciigis en nia lasta numero, okazis diskutado pri la raporto. Malgraŭ akra polemiko inter ĉeestantaj idistoj kaj esperantistoj la kunveno akceptis la raporton favoran al lingvo internacia kaj decidis sendi ĝin al la Ligo de Nacioj.

Ligo de Nacioj pri Esperanto.

Decido akceptita de la speciala komisiono pri la rezolucio rilate al la instruado de Esperanto en la lernejoj.

La Commission spéciale, chargée d'examiner les résolutions présentées à l'Assemblée, a pris connaissance de la demande faite par 13 Membres pour recommander l'introduction de la langue auxiliaire internationale Espéranto dans les écoles publiques, afin de faciliter l'entente directe entre les peuples du monde entier. La Commission estime que ce problème auquel s'intéresse un nombre toujours plus grand d'Etats, mérite une étude approfondie avant de pouvoir être abordé par l'Assemblée. Une Commission en a été déjà saisie l'an dernier et a présenté un court rapport pour recommander une enquête du Secrétariat Général sur les expériences déjà tentées et sur les résultats acquis dans le domaine des faits.

Nous proposons que la question soit mise à l'ordre du jour de la prochaine Assemblée et que le Secrétariat Général prépare d'ici là un rapport complet et documenté dans le sens indiqué par le projet de résolution.

Suivant le désir des signataires, le rapport de la Commission 2*) et le rapport du Sous-Secrétaire Général sur sa mission au congrès de Prague seront communiqués aux Membres de la Société sans autre délai.

*) Document 253 17 décembre 1920.

Adopté par l'Assemblée ce matin 15 septembre.

La speciala komisiono, komisiita ekzameni la rezolucioĵn prezentitajn al la kunveno, konatiĝis kun la demando farita de 13 membroj, por rekomendi la enkondukon de la helpa internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj por faciligi la rektan akordon inter la popoloj de la tuta mondo. La komisiono opinias, ke ĉi tiu problemo, al kiu interesiĝas ĉiam pligrandiĝanta nombro de ŝtatoj, meritas profundan studon, antaŭ ol povi esti tuŝata de la kunveno. Unu komisiono estis jam interesigita pri tio la lastan jaron kaj prezentis mallongan raporton por rekomendi enketon de la ĝenerala sekretariejo pri la spertoj jam provitaj kaj pri la rezultatoj akiritaj en la fako de faktoj.

Ni proponas, ke la demando estu metata je la tagordo de la venonta kunveno kaj ke la ĝenerala sekretariejo preparu ĝis tiu dato plenan kaj dokumentitan raporton en la indikita senco per la projekto de rezolucio.

Laŭ la deziro de la subskribintoj, la raporto de la komisiono 2*) kaj la raporto de la ĝenerala vic-sekretario pri lia misio al la kongreso de Praha, estos komunikataj al la membroj de la Ligo sen alia limtempo. (Sekvas subskriboj.)

*) Dokumento 253, 17. decembro 1920.

Akceptita en la kunveno de 15. sept. 1921, matene.

D-ro Steche kaj la Vendreda Klubo.

En la printempo de tiu ĉi jaro aperis unika libro, titolita „La Vendreda Klubo", pri kiu ni volas atentigi ĉiujn en- kaj eksterlandajn gesamideanojn. Vere, tiu libro estas unika en nia jam tre ampleksa esp. literaturo, ĉar ĝi estas verkita de dek-unu anoj de la Vendreda Klubo en Leipzig kun la intenco, honori la nuntempan prezidanton de la Germ. Esp. Asocio, d-ron Albert Steche.

La Vendreda Klubo konsistas el dek-unu membroj, kiuj regule kunevenas ĉiuvendrede, kaj kiujn kuneligis la inklino kaj deziro al serioza, komuna laboro. D-ro Steche estas unu el la „vendredanoj". Senĉese li agadas por Esperanto, per artikoloj kaj paroladoj li interesis la estrojn de registaroj, de komercaj kaj industriaj rondoj por nia movado, li verkis gravajn broŝurojn pri Esperanto, tradukis naciajn literaturaĵojn, gvidis kongresojn kiel prezidanto, li helpas, varbas kaj konsilas; resume, li estas vera esperantisto timanta nek homojn nek malfacilaĵojn. Ni germanoj bone komprenas la motivon de la ceteraj vendredanoj, kiu instigis ilin honori sian kunulon per io tute neordinara.

D-ro Steche estis vere surprizita pro tiu neordinara honoro. Tion pruvas liaj vortoj, skribitaj interalie al la eldonanto de „Esperanto Triumfonta":

Mia honorigo de la Leipzig'aj amikoj estas tute nova formo. *In memoriam* de Mudie la angloj fondis bibliotekon portantan lian nomon. Ankaŭ fakkolegoj jam ofte dediĉis al jubileulo originalajn libre binditajn verketojn. Sed neniam ĝis nun estas iu tiamaniere honorita en Esperanto-lingvo, ĉar ĝi ja ekzistas nur 35 jarojn. La fakkolegoj skribis — se mi flankenlasas la antikvajn — fake en iu vivanta nacia lingvo, do la honorigo estis limigata al fako kaj nacio. Nur malofte la fremdaj gazetoj faris malgrandan reklamon. Sed la unua honorigo en Esperanto estas pli ol tio, ĉar ne fakkolegoj, sed anoj de diversaj metioj parolis, kaj per Esperanto ilia opinio traflugos la tutan mondon. Tio estas ankaŭ multe pli ol ordenoj kaj dekoraĵoj de la pasintaj tempoj. Mi ja sciis nenion pri la intenco de miaj kunlaborantoj kaj ne instigis ilin. D-ro Dietterle faris unue la proponon. Pro tio mi ja povas paroli pri la grava kaj interesa afero. Efika estas tiu nova, rimarkinda formo, ĉar ĉiu esperantisto devas havi la libron, se la enhavo estas grava kaj interesa. Kaj tio en tiu ĉi okazo estas vere ĝusta . . .

Komentaron ni ne bezonas aldoni. Grava kaj interesa estas la enhavo de la libro. Ni nur ĝojas, ke nia ŝatata prezidanto estis tiamaniere honorata pro siaj grandaj meritoj por Esperanto kaj ĝia movado.

En la antaŭparolo al la libro d-ro Dietterle citas konatajn vortojn de Goethe („Faust"): „Kiu alportas multon, alportas al kelkiu ion." La enhavo de la 115-paĝa libro pruvas la veron de ĉi tiu eldiro. Jen la temoj:

1. La romantika verkisto E. T. A. Hoffmann kiel muzikisto (P. Bennemann).
2. Instruo per laboro (A. Degen).
3. Leibniz kiel „antaŭbatalinto por nia ideo" de mondhelplingvo — eraro (D-ro Dietterle).
4. Esperanto kaj la Frey-Ligo (E. Franck).
5. Pri la Lingvaj Respondoj de Doktoro Zamenhof (W. Lippmann).
6. La unuaj jaroj de Esperanto en Leipzig (A. Petold).
7. Serioza laboro (H. Rössel).
8. Scienca teorio de Ostwald pri la koloroj (D-ro E. Stucke).
9. Pri la insulo Korfu kaj la imperiestra kastelo Achilleion (P. Wilhelmi).
10. La ŝtata Saksa Esperanto-Biblioteko (E. Wunderlich).
11. Pri la Esperanto-movado en Britujo depost la fino de l' mondmilito (A. Zealer).

Aldono: Biografiaj notoj pri d-ro Steche kaj resumo pri liaj poresperantaj artikoloj kaj alparoladoj (D-ro Dietterle).

Tre diversspecaj estas la temoj donantaj fakte „al kelkiu ion". Sed ĉiuj artikoloj estas tre zorgeme ellaboritaj kaj nepre legindaj. Ni „transsaltis" neniun, kiel diras d-ro Dietterle en la antaŭparolo. Kun granda intereso kaj plena ĝuo ni finlegis la libron. Ĉu ni ne ankaŭ detale legas revuon nacilingvan pritraktantan diversajn temojn pri mondo, vivo, arto, historio, tekniko, sociaj aŭ kulturaj demandoj? Certe jes, ĉar la legitaĵo klerigas nin.

Sed ni ne forgesu la ĉefaĵon, la stilon. Tre bona estas la stilo de ĉiuj artikoloj, kaj pura estas la lingvo, kies vivantecon ni spirite perceptas kaj sentas. Esperanto, vivanta lingvo, servanta ĉiun por esprimi ideojn kaj faktojn senpene kaj senpere al tutmonda aŭskultantaro, por komprenatigi la grandan miraklon: Per unu lingvo por ĉiuj gentoj!

La verkado de originalaĵoj superantaj ĉiun tradukaĵon estas valora servo al la antaŭenpuŝiĝo de nia movado, ĉar ĝi evidente pruvas la plenan taŭgecon de Esperanto, la internacia interkomprenigilo.

La libro rekomendas sin mem per sia boneco laŭ enhavo kaj stilo.

Jam pro tio, ke grava germana eldonejo ĝin presis, t. e. aperigis, kiu tre skeptike rigardas la aferon rilate al la multnombreco de la aĉetontoj, ni ĉiuj aĉetu la libron pruvante, ke ni akcelas la venkon de nia granda ideo, ke nia movado estas gravega faktoro en la mondo, potence kreskanta kaj fine — triumfonta. *M. Butin.*

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Pri la Postkongreso en Reichenberg

ni ricevis, bedaŭrinde nur tri semajnojn post ĝia okazo, detalan raporton de la sekretario de la Germ. Esp. Grupo, s-o Palme, laŭ kiu la post-

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlovskaja.

(55-a daŭrigo.)

Trans la ponto li ekiris ĉiam rekten, laŭlonge de la stratoj de Brooklyn. Li esperis, ke trans la rivero finiĝos tiu malbenita urbego kaj komenciĝos kamparo, sed li jam estis marŝanta en la daŭro de almenaŭ tri horoj, kiam fine la domoj fariĝis malpli grandaj kaj en iliaj interspacoj kreskis arboj.

Mateo spiris plenbruste kaj per avidaj okuloj serĉis kampojn kun maturiĝanta greno aŭ herbejojn kun freŝa verda herbo. Li supozis, laŭ rusaj spertoj, ke jam estas ĝusta sezono por falĉi herbon, kaj ke la greno baldaŭ devas esti preta, kaj li pensis jene:

Ha! Mi aliros la unuan falĉiston kiun mi vidos, prenos la falĉilon, eksvingos ĝin du, tri fojojn, tiam oni sen lingvo komprenos, kia homo mi estas! Homoj, kulturantaj teron, devas esti pli simplaj kaj certe ne demandos min pri pasporto. Sed kiam do finiĝos la malbenita urbego?

Nun ambaŭflanke de l' vojo staris jam modestaj domoj unu-du-etaĝaj. Sur kelkaj pendis modestaj elpendaĵoj same kiel en Rusujo, inter la fenestroj aŭ super la pordo. Ĝardenoj renkontiĝis pli ofte; la ŝoseo iris tute rekte, kiel peco da tolo, sternita sur tero . . .

De tempo al tempo aperis sur la strato tramvagono, simila al malluma kesto, brilis en sunradioj, kreskis alproksimiĝante kaj preterkuris, kaj en la perspektivo montriĝis nova vagono.

Iafoje ŝajnis, ke tuj ĉio finiĝos kaj komenciĝos libera ŝoseo, ĉirkaŭita de kampoj, kun vico da telegrafaj kolonoj, kun izolita poŝtveturilo, kun maro da maturaj grenoj ambaŭflanke ĝis la horizonto. Poste — klarakva rivereto, malgranda ponto, herbejo, kaj afablaj kamparanoj, laborantaj sur la kampoj . . .

Sed anstataŭe jen subite ree arego da domoj montriĝis el post la verdaĵo, ree kvazaŭ nova urbo komenciĝis; kelkloke meze de modestaj domoj ree ekaperis ses-sep-etaĝaj domegoj kaj post kelkaj minutoj da marŝado — ree malaltaj dometoj . . . Sed la ŝoseo ĉiam restas sama, kvazaŭ la urbego ne havus finon, kvazaŭ ĝi okupus la tutan teron . . .

Ĉio estas nekonata, fremda. Tie kaj tie ĉi en ĝardenoj vidiĝis stranga verdaĵo, alligita al maldikaj arkformaj stangetoj: observinte pli atente, Mateo rekonis vinberojn . . .

Fine inter la arboj montriĝis peco da nigra kiel veluro plugkampo. Mateo rapide sin ĵetis tien kaj komencis rigardi el post la arboj de l' vojo. Sed tio, kion li nun vidis, fluigis la sangon al lia koro! Tio estis granda peco da plata plugkampo, ĉirkaŭ 900 hektaroj, — barita ne per plektobarilo nek per palisaro aŭ stangoj, sed per pikilhava ferfadeno. Ĉe unu rando de tiu kampo fumis granda kamentubo de fumnigrigita fabrika konstruaĵo. Ĉe alia rando staris lokomotivo, belaspekta brilanta maŝino sur radoj. La svinga rado rapideme sin turnadis, piŝtoj konstante frapadis, blanka vaporo elpuŝiĝis je dikaj mallongaj strietoj. Apude, egalmezure moviĝante, naĝis en la aero kondukanta rimeno. Postsekvante ĝin per la okuloj, Mateo vidis, ke de la kontraŭa rando de l' kampo, kolere fosante teron kiel grandega besto, rampas vera maŝino kaj mordas, kaj fosas, kaj forjetas grandegajn tavolojn da humo . . .

Mateo sin signadis kruce. — Ĉiu animo laŭdu Dion! Por kio oni povas bezoni ĉi tie saĝan ĉevalon, respektindan virbovon, firman brakon, bonajn okulojn, homan sperton? Kion do li estos laboranta en la lando, se tiamaniere oni ĉi tie plugas kampojn?

Kelkaj viroj gvidis la laboron. Eble, ili estis nur provantaj la maŝinon, eble, jam plugantaj la kampon, sed neniu el ili similis nian plugiston. Mateo forkuris de ili al alia flanko, kie inter la verdaĵo brilis akvo.

Li avide kliniĝis por trinki, sed la akvo estis sala. Ĉi tie denove estis la maro; du, tri velŝipetoj vidiĝis inter la bordo kaj la insulo. Kaj tie, kie la insulo finiĝis, sterniĝis super la nivelo de l' akvo apenaŭ videbla fumo de vaporŝipo. Mateo falis sur la teron, ĉe la bordo, ĉe la rando de l' amerika lando, kaj per avidaj, febre flamantaj okuloj rigardis tien, kie trans la oceano restis lia tuta vivo. La fumo de l' vaporŝipo iom post iom fandiĝis kaj malaperis.

Dume trans la insulo la suno subiris. Ondo post ondo senbrue alfluadis al la bordo, kaj la ŝaŭmo fariĝis ĉiam pli blanka, la ondoj pli nigraj. Al Mateo ŝajnis, ke li dormas, ke en sonĝo senbrue plaŭdiĝas ĉi tiuj strangaj ondoj, estingiĝas la ĉielruĝo, kaj la plena luno, granda kaj revema, pendas en la violkolora diafana vespera nebulo . . .

La ondoj ĉiam kaj ĉiam plaŭdiĝas, kaj sur iliaj dorsoj, rondetoj kaj ŝanceliĝaj, ŝanĝlumis jen blanka ŝaŭmo, jen blua profunda ĉielo, jen arĝentaj lunradioj aŭ ruĝaj lanternaj fajroj, kiujn iu viro, senbrue preterglitante en malgranda ŝipeto, bruligadis, — Mateo ne sciis por kio, — en diversaj lokoj super la mara nivelo.

Poste ree kvazaŭ en sonĝo aŭdiĝis voĉoj, krioj, laŭta rido. (Daŭrigota.)

kongresa vojaĝo al Reichenberg kaj la festaj aranĝoj en tiu finurbo de la vojaĝo bone sukcesis.

La salutkunvenon en la komerca ĉambro (dimanĉon la 14. aŭg., matene) ĉeestis urbestro d-ro Bayer, d-ro Reichel de la komerca ĉambro kaj d-ro Pichler de la foiroficejo. D-ro Reichel certigis pri la granda intereso de la komerca ĉambro al Esperanto, ĉar ĝi jam uzas Esperanton kiel komercan helplingvon. D-ro Pichler menciis la grandan sukceson, kiun havis la peresperanta propagando de la foiro.

Poste salutis la reprezentantoj de la diversaj nacioj, inter ili s-o Applebaum el Liverpool deklaris, ke li sciiĝis pri la foiro de Reichenberg nur per la esp. varbiloj kaj ke li jam aĉetis en la foiro komercaĵojn valorantajn 1000 sterl. pd.

Posttagmeze okazis vizito al la foirejoj, vespere granda esp. festo kaj lunde oni ascendis la „Jeschken"-monto.

Urba Esp. Lernejo en Arnau (Ĉeĥoslovakio).

S-o prof. K. Truntschka fondis en Arnau urban esp. lernejon laŭ la modelo de la Saaz'a lernejo. La kursoj komencis la 22-an de septembro. Nia celo devas esti, fondi unuflanke urbajn lernejojn por ĉiuj, kiuj transpasis la dekkvaran jaron, enkonduki aliflanke nian lingvon en la popollernejojn. S-o Tr. faris ankaŭ paroladon en Trautenau, sed la fondado de la lernejo ne sukcesis ĝis nun. La 18. sept., la gesamideanoj de Trautenau kaj Arnau faris propagandekskurson al Hohenelbe.

El Budapest.

La 27. aŭg. s-o d-ro Nikolao Bano, kiu reprezentis Hungarujon ĉe la Internacia Blindula Kongreso en Praha, faris ĉe la kunsido de la budapestaj blinduloj hungarlingve raporton pri tiu ĉi kongreso. Ĵurnalo skribis pri lia parolado longan interesan artikolon, menciante, ke Esperanto estas la lingvo de la blinduloj.

La 9. sept. estis en la Socia Muzeo malgranda, sed bonsukcesa literatura festo je memoro de Antoni Grabowski, aranĝita de grupeto ERA en la Landa Esp. Societo.

Nova Grupo en Reims.

En Reims (Francujo) okazis la 11. sept. sukcesa propaganda parolado de s-o Hubert Ferec, prez. de la esp. societo en Strasburgo, en la Labora Borso. El tio rezultis fondo de grupo, kies unua kunveno okazis la 18-an. Adreso: M. R. Peltier, 4, rue de Trianon, Reims.

Brazila Ligo Esperantista.

La Leĝa kaj Justeca Komitato de l' Federacia Senato jus opiniis favore al la aprobo de la projekto jam aprobita de la Deputitula Ĉambro, per kiu Brazila Ligo Esperantista estas konsiderata kiel societo de publika utileco. Ĝi finis sian raporton per la vortoj: „Tiom sufiĉas, por ke la Senato povu rekoni la utilecon vere efikan, kiun la Ligo tuj alportos al la altaj naciaj interesoj." La raportinto estis d-ro Godofredo Vianna, unu el la subskribintoj de la alvoko jus sendita de Brazila Ligo Esperantista al la Ligo de Nacioj.

El la regularo de la Asocio de Brazilaj Katolikaj Skoltoj.

Interpretisto: Scii interparoli, skribi simplan leteron pri temo donita de la ekzamenanto, legi kaj traduki pecon da libro aŭ ĵurnalo en Esperanto aŭ iu ajn fremda lingvo, kaj scii interparoli per la alfabeto de l' surdmutuloj.

Al Poŝtistoj!

19 gepoŝtoficistoj el ses diversaj landoj kunevenis okaze de la XIII-a Kongreso en Praha en faka kunesido. Interalie oni decidis la restarigon de la antaŭmilita Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj (Ilepo). Oni elektis prez. kaj kas. s-on sup. registar-konsilanton Otto Reber, Bamberg; vicprez. poŝtinspektoron Michelis di Rienzi, Paris, kaj d-ron Ed. Spielmann, Bern; sekr. poŝtinspektoron Henr. Rippel, Würzburg. Vigle pridiskutita estas ankaŭ la demando pri reaperigo de „Poŝta Esperantisto". Por ebligi la entreprenon, estas necese, ke ĉiuj poŝtoficistaj gesamideanoj aliĝu. Adresoj de pli ol mil esp. poŝtistoj estas konataj.

Al la poŝt-, telegraf- kaj telefon-oficistoj estu direktata jena alvoko:

Gekolegoj tutmondaj, aliĝu al la restarigita Ilepo, varbu anojn, nomu la adresojn de interesemuloj, sendu poŝtfakajn artikolojn kaj sciigindaĵojn! Sendu la jarkotizon de 10 germ mk. al s-o Reber, Bamberg, Germ., poŝtĉekkonto 9957 Nürnberg. *Rippel*, Ilepo-sekretario.

Portado de Esp. Insignoj.

Polico.

La ministerio por la internaj aferoj en Saksa ŝtato permesis per dekreto n-o 1681 a II L. P. I de 29. 7. 21, ke la ŝtataj policistoj, kiuj sukcese partoprenis esp. kurson kaj pruvis siajn lingvokonojn per ekzameno de GEA, povas porti la esp. insignon. La insigno konsistas en kvinpinta stelo de malhelverda drapo sur grizeverda drapo kaj estas portota ĉirkaŭ la maldekstra maniko de la bluzo kaj de l' mantelo. La kostojn devas pagi la portantoj de la insigno. — La dekreton subsignis la ĉefo s-o Reichardt.

Plia Sukceso de Esperanto.

Itala Societo por la Progreso de la Sciencoj akceptas poresperantan rezolucion.

En Trieste okazis de la 8-a ĝis la 13-a de septembro 1921 la XI-a Kongreso de la Societo por la Progreso de la Sciencoj, la plej alta organizaĵo por la sciencaj italaj rondoj. Dank' al la klopodoj de niaj italaj samideanoj, precipe de s-o prof. Alb. Alessio, Torino (komitatano agema por la novstarigo de Internacia Scienca Asocio kaj Scienca Revuo), jena grava rezolucio estas aprobita:

La Kongreso de l' Itala Societo por la Progreso de la Sciencoj kunvokata en Trieste por sia XI-a kuniĝo, aŭdinte en ĝenerala kunsido la raporton de prof. Alberto Alessio pri la uzado de Esperanto en internaciaj sciencaj ritatoj,

esprimas la deziron, ke ĉiuj studantoj kaj, ĝenerale, aŭtoritatoj favoru la disvastigon de Esperanto kiel taŭga rimedo por facila interŝanĝo de l' penso inter diversnaciaj personoj,

kaj elektas komisionon de profesoroj *Nesini, Peano*)* kaj *Alessio*, kiu — eventuale kun aliaj membroj aldonotaj — prenu sur sin la taskon raporti, je l' okazo de la venonta kuniĝo de la Societo, pri la kondiĉoj de la tutmonda esperanta movado kaj pri la plej taŭgaj rimedoj por faciligi ĝian disvolviĝon.

*) Prof. Peano estas la aŭtoro de simpligita latina lingvo.

Poŝto.

La estraro de la Poŝto kaj Telegrafo en Nederlando enmetis en la Fakajn Informojn de 7. sept. sub n-o 680 jenan informon: ESPERANTO. La koncernaj direktoroj povos permesi al oficistoj, kiuj kapablas paroli Esperanton kaj kiuj esprimas tiurilatan deziron, pendigi ĉe sia giĉeto tabuleton kun la vortoj „Oni parolas Esperanton" dum la tempo, kiam ili dejoras tie; kondiĉe ke tiuj oficistoj estas respondaj pri la forpreno de la tabuletoj tuj, kiam ilia dejoro finiĝas. — Tiu sukceseto estas sekvo de peto sendita al la estraro de s-oj J. B. B. Dufrenne kaj H. S. Donker. Ili ankaŭ proponis enmeton de Esp. en fakekzamenojn ĉe sia fako kaj konsenton pri uzado de poŝtoficejaj ĉambroj por kursoj, sed provizore la estraro ne povas konsenti tiujn punktojn.

Informoj al Poloj.

En Pola lando sola reprezentanto de ET estas s-o Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak-Przedm. 10. Li prizorgas ĉiujn administrajn kaj kasajn aferojn, kaj en ĉiuj tiurilataj aferoj oni sin turnu ekskluzive al li. Abonoj, mendoj, adresŝanĝoj, tekstoj de anoncoj kaj ĉiuj pagoj estu farataj sole al s-o O. kaj neniam rekte al la eldonejo de ET. Nur manuskriptoj estu sendataj rekte al la redaktejo en Köln-Horrem.

Skribante al nia reprezentanto, oni nepre aldonu poŝtmarkojn por afranko, se oni deziras respondon.

Zorgantoj pri la „opa vendado" antaŭpagu al s-o O. certan sumon (eble mil mk.), por ke li malfermu konton por ĉiuj. Ne forgesu repagi ĝustatempe, por ke ne okazu interrompo en la sendado de la gazetoj.

Por la iam germanaj partoj de Pola lando ni havos baldaŭ specialan reprezentanton.

Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

LIBROJ.

LA VENDREDA KLUBO. Dek-unu diversaj artikoloj verkitaj de la „vendredoklubanoj" en Leipzig. 115 pĝ. 15:23 cm. 1921. Eldonejo: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Prezo: karton. 15 mk. plus 20% T. (multekosteca altigo).

Bedaŭrinde ni ricevis la recenzajn ekzemplerojn de tiu ĉi bonega libro tre malfrue. Vidu la apartan artikolon en la hodiaŭa numero.

ŜAKLUDADO de Josefo Giacosa. (Itale: Una partita a scacchi). Esperantigis verse fratoj P. kaj R. Padulli. Kolekto de la Revuo „L'Esperanto". 47 pĝ. 15:18 cm. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) 1921. Prezo: broŝurite 5 lir.

El romanco provence verkita en la dekkvara jarcento la tradukintoj-poetoj prenis la temon, kiu pritraktas amaventuron de juna paĝio. Gajninte je ŝakludo la kuraĝulo fine edziĝas al riĉa nobelulino. — La belaj versoj de la unuakta teatraĵo pruvas la lertecon de la tradukintoj. Preseraroj mi ne trovis. Kelkaj lingvaj strangaĵoj ekz. origi anst. orumi, maltegi anst. ne protekti, mi mema anst. mi mem ktp. ne malhelpas, ke la impreso de la efektplena komedieto estas bona. — Laŭ moderna vidpunkto oni ne prijuĝu la versaron, ĉar en la XIV-a jarcento oni verkis iom fantazie. La enhavo de nia rakonto estas tia neverŝajnaĵo, sed ĝi tamen plaĉas pro la belforma lingvo. (G. Ajul.)

GAZETOJ.

ESPERANTIDA. Sept. 1921.

Oni ne scias, ĉu plori aŭ ridi. Post kiam „La Vojo", kiun Antido montris al ni en sia nova gazeto, de kiu aperis nur unu numero, ŝajne lin kondukis antaŭ ne trapenetreblan muron, li nun revenas al sia antaŭa projekto, sed ne sen novaj saĝoj. La akuzativo nun ricevis la finaĵon -u, en plurnombro -un (cetere laŭ nia opinio la antaŭa metodo, formi la akuzativon per prepozicio, estis multe preferinda), eĉ la bela tabelo de „korelatan vorton", pri kiu Antido pleje fieris, estas ŝanĝita. Sed li asertas, ke „oni povas nun fidi ye la lingvo Esp-ida kay plu ne timi, ke Antido faros novan chanjun, kar alia sistemo ne existas" kaj „La Esperantida estas la sola ebla riformo de Esp-o", t. e. se oni volas konservi la elasteon de la lingvo. — Ni ne diras, ke la nuna definitiva (?) formo de Esperantida estas maltaŭga, sed por kio Antido provas per siaj ĉiamaj ludadoj maltrankviligi la seriozan mondlingvan movadon? (T. J.)

ĈEĤOSLOVAKA GAZETO. N-oj 3-4. Praha, 5. sept. Kun diversaj detalaj raportoj pri la 13-a. Aldono: Nova Eŭropo.

JUNULA VOĈO. N-o 1. Sept. Redaktanto: J. Lejzerovič, Lodz (Pol.), Kilinskiego 28. Nova manskribita, hektografita, duonmonata gazeto. Organo de Junula Esp. Soc. en Lodz.

KATOLIKA MONDO. N-o 1. Paulus-Eldonejo, Graz (Aŭstr.), Karmeliterplatz 5.

Ni ne komprenas, kial aperas nova gazeto de Internacio Katolika anstataŭ „Espero Katolika". Nek en „Katolika Mondo" nek en la raporto ricevita pri la kat. konferencoj ni trovis klarigon pri tio.

LE MONDE ESPERANTISTE. Jul.-aŭg. Kun artikolo „Fausse Route" pri CO, Carlo Bourlet ktp.

PROSPEKTOJ.

FIWA. Kvarpaĝa prospekto (35:44 cm) de Industria kaj komerca Societo „Continental" en Bremen, Germ., Langenstr. 60, verkita en lingvoj germana, esperanta, angla, franca, itala, hispana, portugala kaj rusa, pri la filmo „La reĝo de Galkonda".

Por „Esperanta Ligilo"

alvenis pluaj donacoj. Jen la bonkoraj donacintoj:

6. M. v. Aelst, St. Gilles, Bruxelles, Belg.	55 gmk.
7. H. S. Donker, Postkantoor, Amsterdam, Nederl.	54 gmk.
8. Dimitr Simeonov, Naroden Magazin, Sofia, Bulg.	10 gmk.
9. J. Thiébault, Carignan, Franc. (20 fk.)	140 gmk.
10. Esp. Soc. Charlottenburg, Germ.	40 gmk.
11. J. D. Applebaum, Liverpool, Brit.	25 gmk.
12. Miguel Ribas de Pina, Palma de Mallorca, Hisp.	10 gmk.
13. Albert Meckenstock, Bredenscheid bei Hattingen, Germ.	8 gmk.
Entute	302 gmk.
Antaŭa sumo	100 gmk.
Tuta sumo	402 gmk.

Al niaj Legantoj.

Dante kaj Grabowski.

En oktobro kaj sekv. monatoj, kiam ET estos pli ampleksa kaj ilustrata, ni intencas dediĉi 2—4 kolonojn de ĉiu numero al iu speciala temo, ekz. pri konata persono, pri iu lando aŭ regiono aŭ urbo, kaj ni deziras klarigi aŭ plibeligi la artikolojn pri tiuj temoj per ilustraĵoj. Interalie ni intencas dediĉi unu numeron al la fama itala poeto Dante, kiu mortis antaŭ 600 jaroj, la 14. sept. 1321, kaj alian al la plej fama esp. poeto, nia neforgesebla s-ano A. Grabowski. Ni jam posedas artikolon pri Grabowski, sed mankas ankoraŭ fotografaĵoj. Pri Dante ni posedas ankaŭ artikolon, sed ne tre detalan.

Ni do petas samideanojn, kiuj posedas bonan fotografaĵon pri Grabowski, bonvole alsendi ĝin, por ke ni farigu laŭ ĝi kliŝaĵon. Ankaŭ ni petas — se eble italajn — samideanojn (sed nur kiuj verkas sufiĉe bonstile!) je artikolo kaj bildoj pri la vivo kaj verkoj de Dante.

Aliajn numerojn ni deziras dediĉi al Finnlando, la lando de la XIV-a, kaj al Helsinki, la venontjara kongresurbo.

Raportoj kaj Anoncoj.

Ni petas insiste, sendi al ni raportojn tuj kaj ne nur post 2—3 semajnoj. Ekzemple, nun jam ne estas aktuale publikigi raporton pri la postkongresa festo en Reichenberg aŭ pri la Ika-kongreso en Graz. Rapideco estas tiom pli necesa, ĉar ni presas du paĝojn (la 1-an kaj 4-an) de nia ĵurnalo jam lunde kaj la aliajn jam merkrede aŭ ĵaŭde. Pro tio ankaŭ anoncoj alvenantaj marde povas aperi nur en la sekvonta semajno. Gravajn anoncojn ni eventuale publikigos sur la 3-a paĝo.

Firmigo de ET.

Ni kredas, ke ĉiuj niaj legantoj aprobas nian deziron fari ET sendependa de iaj materialaj malfacilaĵoj. Preskaŭ ni jam atingis tiun sendependecon: ET jam pagis plene la tutajn preso-, ekspedo- kaj afranko-kostojn. Sed nun venis granda plikarigo. Salajroj plialtiĝis je unu triono, prezoj por papero kaj materialoj estas plialtiĝantaj, minacas plialtigo de l' afrankotarifo. Do ni ne scias alian rimedon ol plialtigi la prezon de la abonoj je ĉ. 20% kaj postuli de landoj kun alta valuto pagon per naciaj monbiletoj aŭ per germanaj monbiletoj laŭ la taga kurzo.

Ni esperas, ke ĉiuj legantoj komprenos la necesecon de tiu ĉi plialtigo kaj ne sole restos fidelaj sed eĉ varbos multajn novajn amikojn al nia entrepreno. Pripensu ankaŭ, ke de mezo de oktobro vi estos riĉe rekompencataj por la malgranda plialtigo per la pliampleksigo kaj plibeligo de ET.

Tial, ne forlasu nin nuntempe, kiam nia entrepreno estas elironta el la kriza tempo en trankvilan ekzistadon! Helpu al ni firmigi ET! Multe vi utilos per tio al nia tuta movado!

Germanajn abonantojn

ni petas insiste aboni ĉe la poŝto. Ne nur vi ŝparos al ni laboron kaj monon, en nuna kvaronjaro vi eĉ mem ŝparos monon per tio: ĉar, abonante ĉe la poŝto, vi pagos 15 mk. por la lasta kvaronjaro, sed, abonante ĉe la eldonejo, vi devas pagi de nun 15 mk. ET estas enlistigita en la poŝta gazetlisto, komplementoj 5 kaj 9, sub rubriko „Artaj lingvoj".

Atentigo.

Al nia hodiaŭa numero estas aldonita prospekto pri restarigo de Int. Scienca Asocio kaj Scienca Revuo. Ni rekomendas la prospekton al la atento de niaj legantoj.

Lina Schaumlöffel
Johann Nelz
GEFIANĈOJ

Friedrichsthal (Germ.) 25. septembro 1921.

Gazetaro.

Esperanto en germanaj gazetoj.

BAYERISCHE LANDESZEITUNG. Würzburg. 25. aŭg. Kun traduko de „Letero el Bulgario" el ET.

DIE ROTE FAHNE Berlin, 27. aŭg. kaj 5. sept. Kun artikoloj pri Esp.

FREYTUM Organo de la germana Frey-Ligo. Plej nova n-o kun artikolo „Esperanto kaj Frey-Ligo".

FRANKFURTER MESSZEITUNG. 5. sept.

BRAUNSCHWEIGER KURIER Braunschweig, 15 sept. Kun traduko de „Letero el Polio" el ET, sed sen mencio de ET aŭ IES.

Sveda gazetaro.

19 el la plej grandaj ĵurnaloj raportis pri la sveda karavana vojaĝo al Praha kaj pri la 13-a kongreso en 5-kolonaj artikoloj, verkitaj de s-ano Halldor. Dum la lasta semajno aperis en la sveda gazetaro sume 38 grandaj aŭ malgrandaj artikoloj koncernantaj Esperanton.

Esperanto en alilandaj gazetoj.

LA SUISSE, ĉiutaga en Genève, enhavas artikolon „Esperanto antaŭeniras" pri kongreso de Praha, de Stello.

LA CONFERENCIA, Jerez de la Frontiera, Hispani, de 22. aŭg., enhavas artikolon pri Esperanto.

DIE SCHELDE. Antwerpen (Belg.), 15. sept. Flandra matenĵurnalo, kun „Letero el Polio" laŭ ET.

L'INDEPENDANCE BELGE. Grava ĉiutaga ĵurnalo de Bruxelles, 5 sept., kun favora artikoleto pri parolado de s-o Demarcy ĉe Int. Universitato.

DOS NAJE LEBN. Bialystok (Pol.), 6. sept. Hebrelitera gazeto, enhavas detalan raporton pri la 13-a, de J. Sapiro.

CLOS POLSKI. Warszawa (Pol.), 4. sept. Politika artikolo pri Kongreso Cionista, kiu estas parte verkita laŭ traduko de „Letero el Palestinio" el ET n-o 44; mencias ET.

VOLKSZEITUNG. Bromberg (Pol.), 27. aŭg. kaj 5. sept. Enhavas esp. angulojn en Esperanto kun apudmetita germana traduko.

DANZIGER VOLKSBLATT, 20. kaj 27. aŭg., 1. kaj 5. sept. Diversaj raportoj pri la 13-a, pri kurso ĉe kat. helpista unuiĝo k. a.

KÄRNTNER TAGEBLATT en Klagenfurt, 27. aŭg., enhavas longan artikolon pri Esp.

REICHENBERGER ZEITUNG. Reichenberg (Ĉeĥosl.), 17. aŭg. Kun detala raporto pri la postkongresa kunveno en Reichenberg.

KAJA. Tallin (Est.), 4. sept. Enhavas tradukon de „Letero el Bulgario", sed sen mencio de ET aŭ IES.

PÄEWAHLET. Tallinn (Est.), 4 sept. Enhavas artikolon pri ĉefurbo de la mondo, trad el ET de J Wahtkeri.

O JORNAL. Rio de Janeiro (Braz.), 1. aŭg. Granda tagĵurnalo, enhavas artikolojn pri esp. oficejo de Foiro de Frankfurt, pri Esp. en lernejoj kaj Esp. kaj komerco.

Atentigo al ne germanaj abonantoj.

Neatenditaj plikostoj por salajroj, papero kaj preskaŭ ĉiuj materialoj kaj minacanta plialtigo de la afranko devigas nin fiksi novajn abonkondiĉojn.

Antaŭ ĉio, pro la granda malaltiĝo de la germana valuto, estonte ni povos akcepti abonpagojn en germana mono nur laŭ la taga kurzo.

La abonoj por la diversaj landoj estos de nun:

12 svis. fk., ŝil., dan. kaj norv. kronoj, pes., 10 sved. kr., 6 guldenoj, 3 dolaroj, 20 fr. aŭ belg. fk., 30 liroj, 60 finn. mk., 70 ĉsl. kr., 200 hung. kr., 400 aŭst. kr., 800 poln. mk.

Balkanŝtatoj, Litovio kaj Latvio pagu 60 germ. mk., Estonio 40 germ. mk.

Al polaj, aŭstraj, hungaraj kaj estonaj abonantoj ni sendos du n-ojn kune.

Ne estas necese pagi tutan ĵarabonon je unu fojo. Oni alsendu laŭvolan sumon (en naciaj bankbiletoj per registrita letero), kaj ni sendos tiom da numeroj de nia ĵurnalo, kiom valoras la pago.

La abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

La prezoj por la opa vendado aliiĝos nur post la pliampleksiĝo de ET meze de oktobro.

Anoncoj

kostas po kvadratcentimetro 1 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 40% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%).

Anoncetoj

kostas por 1-2foja enpreso kaj po 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpreso ni kalkulas la duoblon. Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto) estas senpagaj.

Anoncetoj pri korespondo kaj interŝanĝo

kostas por 1-2foja enpreso kaj po 15 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpreso ni kalkulas la duoblon.

Germanoj povas pagi monon al nia poŝtĉekkonto: Köln 70865 por Teo Jung, Horrem.

Esperanto-Verlag Berlin S 59
Friedrich Ellersiek ••• Wissmann-Str. 46
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko"

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkupono aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

Internacia Eksped- kaj Transport-Oficejo
ALEKSANDER ROZANYKWIAT & K-io, VARSOVIO, DLUGA 23.

KOMERCAĴ-EKSPEDADO

al ĉiuj urboj de Polujo, Litovujo, Germanujo, Aŭstrio, Francujo, Rumanio, Usono kaj „vice-versa".

Dogano, enkasigo, asekurado de ŝarĝaĵoj kontraŭ tuta aŭ parta ŝtelo.

Propraj tenejoj korespondantaj en 42 urboj.

Oni korespondas en ĉefaj eŭropaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

Oni serĉas rilatojn kun seriozaj eksterlandaj eksped- kaj transport-firmoj.

Artaĵo-, Bildo-, Libro-Vendistoj kaj Art-Amikoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstriaj, turnu sin al

SEPP OSTERER, GRAZ, AUSTRIO,
Gleisdorfergasse 5.

Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Pogranda Manufaktura Magazeno de enlanda kaj eksterlanda manufakturo

M. Bukszpan, Varsovio
Nalevki 29. Telefono 266 39.

Korespondado en Esperanto.

Deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj manufakturaj firmoj.

Direktu ofertojn al la direktanto Adolfo Oberrotman.

Komercdomoj, Komercistoj, Reprezentantoj

uzu en via propra intereso la servojn de la

Komercista Esperanto Grupo
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14

kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj.
Perado senkoste!

1914—1918.

1. La germana militŝiparo dum la mondmilito.
   500 fotografaĵoj en poŝtkarta formato; bildoj montrantaj historiajn momentojn el la marmilito, agoj de la submarboatoj, batalmomentoj, grenadtrafoj, ŝipsubiroj kaj aliaj vidindaĵoj. Unuaranga kolekto. Prezo po 1 ekz. 60 germ. pfg.
2. Albumo enhavanta serion de germ. submara boato dum transmara veturado en malproksimaj regionoj.
   Po ekz. 8 germ. mk.
3. La mardiablo (Seeteufel).
   Kaperveturoj de la fama kaperŝipo „Seeadler", la heroaj agoj de grafo Luckner (2300 marmejloj en velboato kun 5 maristoj), po 30 germ. mk.

Eldonejo Fritz Finke, Wilhelmshaven,
Germanio.

Oni korespondas en Esperanto.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memoraĵo por ĉiu esperantisto.

Presita sur luksa papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografaĵoj.

(Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo 15 germ. mk. kaj sendkostoj.

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta", Köln-Horrem.

Intarsioj.

Marketro-fabrikaĵojn el ligno, perlamoto kaj metalo por fabrikejoj de mebloj, horloĝoj je favoraj kondiĉoj liveras

H. Knaup, Artmetiejo por Intarsioj. Karpfengasse 8, Heidelberg (Germanio)

Oni petu specialan proponon! Reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Anoncetoj.

EDZIĜO. Geesperantistoj: Hermann Scheider kaj Else Scheider nask. Ruderisch, salutas kiel geedzoj. — Plauen i. V. (Germani.), Gunoldstr. 40. — Septembro 1921.

PROPAGANDILOJN ĉiuspecajn bonvolu sendi por propaganda ekspozicio, gazetojn, prospektojn ktp. Mi resendas belegan Rejn-karton. P. Becker, del. de UEA, Mainz a. Rh., Germ., Holzstr. 10.

VIZITANTOJ DE KINEMATOGRAFO el ĉiuj landoj (krom Germani.)! Kiu el vi pro perfektiĝo en Esperanto aŭ kontraŭ laŭdeziraj reciprok-servoj miaflanke sendadus al mi detalajn filmenhavojn (aŭ presitajn kinematografajn programojn nacilingvajn) de la plej novaj filmoj de via lando? Menciu fabrikfirmon! Poŝtelspezojn mi redonos. V. Markuse, cand. phil., Berlin-Wilmersdorf, Duisburgerstrasse 5, II.

AMO PER PROVERBOJ. Unuakta komedio de Arthur Azevedo. El la portugala lingvo tradukis A. Couto Fernandes. Eldonejo Oskar Ziegler & K-io, Markt-Redwitz (Germ.). Prezo 5 resp.-kuponoj. Aĉetebla ĉe la tradukinto: Laranjeiras, 225, Rio de Janeiro, Brazilio. — Komedieto tre taŭga por la prezentado.

PROPAGANDILOJN ĉiaspecajn bonvolu sendi por granda propaganda ekspozicio okazonta dum la 11-a Germana Esp. Kongreso 1922 en Breslaŭ al Georg Habellok, Breslau 10 (Germ.), Schleiermacherstr. 19. Mi kompensos ĉiun sendaĵojn per il. poŝtk. de Breslau.

INĜENIERO-konstruisto-fervojisto, solema, 55-jara, serĉas fakan okupon ĉe ekspluato aŭ konstruo de fervojoj. Dezirindaj landoj por mi estas: Afriko suda aŭ norda, Argentinio, Brazilio, Chilio, Ĉinio, Jamajka insulo, Urugvio, Aŭstralio, Nova Zelando kaj aliaj ne-eŭropaj landoj. Proponojn oni bonvolu sendi laŭ adreso: Polando, Tarnow, poste restante, al inĝeniero Ilya Dobreniĉenno. Kolegojn kaj samideanojn mi petas helpi min en tiu ĉi afero.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Sam Owen Jansson, Skogen 28, Lidingö Villastad, Svedujo, studanto, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun ĉiulandaj samideanoj. Kolektas poŝtmarkojn.

S-o M. Ohtani, 105, Kobai-ĉo, Kita-ku, Osaka, Japan., deziras korespondi kun lingvaj geinstruistoj aŭ gelernantoj kaj komercistoj, per leteroj aŭ ilustr. poŝtkartoj. Kolektas geografiajn kartojn kaj interŝanĝas gazetojn aŭ librojn en Esperanto aŭ nacilingvo. Ankaŭ ŝatas versaĵojn.

Gelernantoj de la esp. kurso ĉe Osaka Siminkan (Urba Domo) deziras korespondi kun gelernantoj tutmondaj. Precipe bonakceptas leterojn aŭ poŝtkartojn ilustr. de ekstreme malproksimaj landoj. Rusoj, hispanoj, hindoj k. a. sendu al adreso: Esperanto-kurso, ĉe s-o M. Ohtani, 105, Kobai-ĉo, Kita-ku, Osaka, Japanujo.

Ĉokolad-laboristo deziras korespondi kun kolegoj el ĉiuj landoj. Paŭlo Nath, Libera Urbo Danzig, Germ., Schmiedegasse 26.

S-o Herman Brukarz, Staromiejska 40, Miedzyrzec, Polio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., leteroj, poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj (bfl.).

Eugenio Hanelt, Poznan (Polujo), Siemieradskiego 2, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. nur kun fraŭlinoj de Hispanujo, Japanujo, Italujo, Persujo, Turkujo, Albanujo, Anglujo kaj Ameriko.

S-o Voldemar Grünthal, Tallinn, Estonio, Lüvalaia tän 48 a, ks. 7, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Johannes Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildfl.) nur kun fraŭlinoj.

S-ino Hilja Valve, Kausala, Radonsuu, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn de vidindaĵoj kaj pejzaĝoj.

S-o Vladas Niunkis, 14-jara gimnaziano de V-a klaso, interŝanĝas per poŝtkartoj ilustr. kaj poŝtmarkoj. Adreso: Litovio, Šiauliai, Telegrafas, Niunkenei.

Vladimir Peresadin, 16-jara, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Petrograd, Rusio, Nikolaevskaja 74.

Mi serĉas personojn, kiuj deziras korespondi pri infana psikologio, pedagogio kaj eksperimenta psikologio. Sciigu novaĵojn, sendu priskribojn de laboroj kaj organizaĵoj. Responde mi komunikos la sukcesojn, kiujn ni havas en tiuj ĉi sciencoj. Sendu librojn, fotografaĵojn ktp. al Direktoro de Eksperimenta Psikologia Laboratorio, s-o Vs. Basov en Orel, Ruslando, 2-a Posadskaja str. 19.

Hellmut Schmidt, Breslau 18, Ahornallee 6, Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, precipe el Sud-Eŭropo.

Wilhelm Lang, Essen-Dellwig (Germanio), Lutherstr. 8, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun la tuta mondo.

Mi deziras korespondadon kun ĉiuj landoj per leteroj, ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Joseph Düllmann, Hagen i. W., Germ., Körnerstr. 75.

S-o Edmund Kuhn, studento, Klein Welzheim, Post Seligenstadt, Hessen, korespondas per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.